



FN PER ANC 47

Normanda Esperanto-Bulteno

BULLETIN TRIMESTRIEL

TRIMONATA BULTENO

Nº 48a (nova serio)

Nº 133a AUTUNO 1979

REDAKTAS : S-ino POTTIER 21 Allée des Roitelets - 76190 YVETOT
Sendu la manuskriptojn antaŭ la : 10a de Februaro - 10a de Majo
10a de Aŭgusto - 10a de Novembro
Eldonita de : La ESPERANTO-GRUPOJ DE LA RUENA REGIONO
Ekspedas : HAVRA ESPERANTISTA GRUPO 28 rue Raoul Dufy 76600 LE HAVRE
UNION DES ESPERANTISTES DE NORMANDIE : ccp, 283 40 H ROUEN
KOTIZOJ : Minimuma kotizo : 7.00Fr - Subtenkotizo : ek de 10 Fr
Nura abono al Normanda Esperanto Bulteno sen membreco : 7.00 Fr.

" La verkantoj respondecas pri la enhavo de la subskribitaj artikoloj "

" Y-ZON-KA-L'APPRENDRE-DANS-LEZECELES "

Estas jam sukceso kiam, alkroĉinte iun ĉe strat-angulo, por Esperanto, vi ricevas tiun konkludon !

Jes ja ! " Ili ĝin instru en la Lernejoj ! " ("instruu" , ĉar, tie, la franca vorto "apprendre" signifas "instrui")

Jen kion oni ofte aŭdas kiel aprobon de simplaj homoj kiuj, per sia nekomplika saĝo, ekvidas la veran solvon al la internacia lingvo-problemo .

Kompreneble, ni, anoj de la Movado, bone scias ke la fina sukceso ne estas por morgaŭ; ni konscias ke multaj klopodoj daŭre atendas nin .

Dank'al fervora laboro de sindanemaj Samideanoj, la afero progresas, per Propagando, per Instruado, per Praktika uzado .

Ciu stadio necesigas specialistojn: ne multaj inter ni sentas sin kapablaj lerte propagandi, konvinki por venigi novajn adeptojn, aŭ kompetentaj por instruadi la lingvon, aŭ sufiĉe riĉaj je libera tempo (kaj mono) por flegi la novbakitojn aŭ Grupojn ... kaj tamen....

Tamen...ĉu vi scias ke VI povas helpi ?

Nu! mi bone scias ke vi ne disponas multan tempon, kaj ke vi ne sentas vin kompetenta por aktivi por Esperanto, sed vi povas, sen kosto, kaj sen perdo de tempo, helpi al la disvastigo de la lingvo internacia .

Kion fari ? = INFORMI ! Mi ne diras "Propagandi" ĉar tio estas fako delikata kiu necesigas la konon de kelkaj reguloj por persvadi la homojn ; ne! nur informi pri la FAKTO kiu nomiĝas " Esperanto "

En la komenco, Esperanto povis aspekti kiel utopiaĵo, ludo. Personoj kredas ankoraŭ ke temas pri religio, sekto ! La pioniroj posedis nur sian entuziasmon por batali. Nune, ni estas feliĉaj ; argumentoj kaj nediskuteblaj faktoj kuŝas je nia dispono : revuoj belaspektaj, abundo de libroj, pluraj radio elsendoj , Ni aldonu ke tre bonkvalitaj informoj estas je nia dispono : " Objectif 87 " eldonata de SAT-amikaro aŭ " Une approche de la Langue Internationale " de U F E ... certe, via Grupo posedas ekzemplerojn ... (ili kostas 1 aŭ 2 litrojn da benzino)

.../...

Polycopié par le Groupe Esperantiste Rouennais -

Le Gérant : P.LEMARCHAND - Dépôt Légal - 3ème Trim. 79

.../...

... Do, kiam prezentiĝas oportuneco (konversacio, radio, televido, ktp; kaj tio okazas ĉiutage) ĉu kun samfamiliano, amikoj, kolegoj, via pordistino, ĉu en la buso, kinejo, aŭ salono, ne maltrafu la okazon enŝovi vian informon: ne parolado, sed kelkaj vortoj kiuj evidentiĝas la problemon, aŭ alportas la solvon.

Sed nepre evitu 1° diskuti: en kazo de opozicio, diskuto fariĝas disputo; 2° paroli pri gramatiko (krom se vi estas fakulo...)

Iom post iom, viaj kunuloj ekkonscios pri la lingva problemo, kaj koleros ke oni ne ankoraŭ uzas la solvon... Tiam ili estos maturaj por respondi jese al la proponoj de la specialistoj de la Propagando, kaj VI ridetos, aŭdante, kvazaŭ rekompence:

"Y-ZON-KA-L'APPRENDRE-DANS-LEZECELES"

Johano Ĵibo

VIVO de la GRUPOJ

C A E N

Malgraŭ serio da artikoloj en la gazetoj, la Ĝenerala Kurso ne havis la atendatan sukceson. La esperantistaj Fervojistoj de Caen, siaflanke, sukcesis altiri kolegojn: Ses el ili akurate sekvas perkorespondan kurson; plie, spertaj esperantistoj-fervojistoj gvidas ilin je ilia lernado, korektas, kuraĝigas, ĉiulunde, dum vespera renkonto.

Y V E T O T

Ekzamenoj: La 29an de Septembro okazis ekzamensesio (Atesto pri Praktika Lernado). Du kandidatoj trapasis ĝin sukcese: S-ro Evrard kun cito "Bone" kaj S-ino Sallio.

Informado: Komence de Oktobro, S-ro Evrard partoprenis en la radio-elsendo "Jeu du Disco" de Eŭrope n° 1, kaj, dank'al la fakto ke li tiam surhavis la Esperanto-insignon, oni demandis lin pri Esperanto; li povis tiel trafe paroli pri la lingvo al milionoj da aŭskultantoj. Gratulojn!

Kursoj: Ili jam rekomenciĝis; kurso por komencantoj ĉiumerkrede je la 18 h kun bedaŭrinde nur unu lernanto, kaj kurso por progresantoj, kun preparado al Atesto pri Kapableco. Tiu kurso okazas ĉiuvendre, je la 20a horo.

Estrarkunveno: okazis la 29an de Oktobro. Dum tiu kunveno, oni decidis aĉeti multajn librojn por la biblioteko.

Ĝenerala Kunveno: ĝi okazos la 30an de Novembro, je la 20h 45 en la Junuldomo.

A T E N T I G O: Kiel kutime, la Grupo festos "La Reĝojn" dum la Nova Jaro. Tiu Festo okazos la 20an de Januaro 1980 je la 14h30 en la restoracio de la Junuldomo. Ĉiuj estas bonvenaj.

Bonvolu tamen anonci vian partoprenon minimume unu semajnon antaŭe al S-ino Pottier, 21 Allée des Noitelets, 76190 YVETOT.

D a n k o n !

La estraraĵoj de UNE kaj de la Federacio Normanda kunvenis komune en Caen, la 13an de Oktobro je la 14 h 30. Ĉe estis dek personoj inter kiuj troviĝis kelkaj anoj de la loka Grupo, kaj Pola Esperantisto, S-ro Szmurlo .

Vivo de la Grupoj

Grand Quevilly : 2 000 flugfolioj estis disdonitaj, kaj kvar komunikoj aperis en la ĵurnaloj por anonci la kurson , en " Centre Socio Culturel "

Rouen : Kurso por la Naturamikoj en la Junuldomo (15 lernantoj)
Caen : La kursoj ankoraŭ ne komenciĝis : ili komenciĝos la 22an de Oktobro ;propagando aperis en gazetoj, kaj 20 afiŝoj estis montritaj en magazenoj kaj en publikaj lokoj. Ekspozicio okazis en la librejo Guillaume.

S-ro Lemonnier, fervojisto, sendis cirkulerojn al la fervojistoj de la regiono, por proponi al ili perkorespondan kurson kaj renkontiĝon ĉiusemajne, kun pli spertaj esperantistoj .

Le Havre : S-ro Chalm senlace gvidas kurson ĉe MJC (2 lernantoj)
 Artikolo pri Esperanto aperis en "Guide des Loisirs"

Yvetot : Du kursoj okazas ĉiusemajne .

S-ro Evrard, okaze de konkurso ĉe Europe 1 parolis pri Esperanto

Vire : Sajne, S-ro Legret gvidas kurson .

Ĝenerala Kunveno

S-ro Quillaud gratulas la Havran Grupon pro la bona organizado de la pasinta Kongreso .

Estus dezirinde ke la venonta Kongreso okazu en la regiono de Caen :S-ro Rousseau bonvolas esplori la eblecojn en tiu urbo . Li povus prezenti vespere la diapozitivojn pri Madagaskaro , kun komentario registrita.

Por ke la Kongreso okazu antaŭ tiu de U F E, oni devas organizi ĝin plej malfrue la 30an de Marto (preferinde la 22an/23an de Marto).Se ne eble, ĝi okazu dum Majo (1/6/11 aŭ 31/1an de Junio)

Bulteno

S-ro Rousseau provos verki artikolon pri aerodromoj .

S-ro Quillaud kontaktos ripariston por nia maŝino.

S-ro Gibaux tajpos la ordinarajn stencilojn, kaj S-ro Lemarchand preparos la elektronikajn .

Federacio

S-ro Pottier atentigas ke, pro la foresto de la sekretariino , nun en Grekujo, la estraro ne povas normale labori (manko de kunvokiloj, raportoj, informoj el arĥivoj, ktp...

Seminario de U F E

Ni ne povas respondi la unuan demandon (ĝi bezonas enketon)
 La dua punkto ĉefe estas maniero pripensigi la homojn .

Esperanto en Pollando (paroladeto de S-ro Szmurlo)

En Pollando, Esperanto disvastiĝas precipe en la katolikaj medioj. La Grupoj ne povas libere decidi pri sia programo. Ili devas proponi ĝin unu jaron antaŭe, kaj peti subvencion de instancoj, kiuj donas monon nur se tio plaĉas al ili. Ili ofte neglektas la Movadon. La revuo "Pola Esperantisto" de Januaro ankoraŭ ne aperis! Antaŭ nelonge, iu libro aperis nur ĉar ĝi estis mendita el Ĉekoslovakio, ĉar la Pola ĵ instancoj bezonas ĉekan monon. La ŝtato kontrolas ĉion: por instrui Esperanton, oni devas esti rajtigita, uzi lokon akceptitan de la ŝtato, ktp...

BATALO KONTRAU INFLACIO ? ?

INVESTU EN LA ESPERANTO MOVADO ! !

Cotisations et Abonnements pour l'Année 1980

Associations Françaises :

U F E (Union Française)	Membre Simple	=	25
	Membre Abonné	=	90
SAT-Amikaro	Membre (reçoit la Revue)	=	60
	Jeunes, jusqu'à 25 ans	=	40
	(nouveaux abonnés + 2,50)		
Le Travailleur Esperantiste	(Bulletin mensuel)	=	20

Associations Internationales :

U E A (Association Esperantiste Universelle)			
M.J. Membre, reçoit l'annuaire	=	48	
M.A. Membre abonné, annuaire + revue Esperanto	=	120	
Revue seule	=	60	
S A T (Sennacieca Asocio Tutmonda)			
Membre, reçoit la revue "Sennaciulo "	=	80	
Revue " Sennacieca Revuo " (1 fois par an)	=	16	
HEROLDO	Journal bi-mensuel	=	64
EL POPOLA ĈINIO	Revue Chinoise, mensuelle	=	14
	2 ans	=	21
	3 ans	=	28

Où Régler ?

U F E , U E A , HEROLDO , EL POPOLA ĈINIO :

Féd. Normande Centres Culturels Esperanto

CCP 2 348 06 C ROUEN

Correspondance : S-ro TAILPIED La Marvento
Hennequeville 14100 TROUVILLE

SAT-Amikaro : S-ro André SADIER
22 Av. Paul Vaillant Couturier
Bat. N.D. 93000 BOBIGNY
CCP 765805 C PARIS

SAT 67 Avenue Gambetta
75020 PARIS
CCP 1234 22 PARIS

LE TRAVAILLEUR ESPERANTISTE : 179 rue Ordener
75018 PARIS
CCP 902 52 F PARIS

SI VOUS ETES INTERESSE par une Association Spécialisée ,
demandez-nous ce que vous souhaitez : à part les collection-
neurs de boites d'allumettes, il ne manque pas d'Associations
ou " Fakoj " à votre disposition)

ET , NATURELLEMENT : Union des Esperantistes de Normandie
CCP 283 40 H ROUEN

(Pra-epoka kotizo : 7 F ! sed oni akceptas pli !

K o r a n d a n k o n a l ĉ i u j . . . k a j ,

F E L I Ĉ A N N O V J A R O N 1 9 8 0

L E H A V R E

ĜENERALA KUNVENO 20.10.79 Ĝi okazis en la domo de la M.J.C.

19 Membroj ĉe-estis kaj 4 senkulpiĝis .
La Prezidanto refoje dankas al la Junuldomo kiu denove akceptas nin dum problemoj ĝenas ĉe François 1er . Li anoncas baldaŭan revenon en Le Havre de S-ino Peltier, nia antaŭa Prezidantino .
Resumo de la Raportoj, Moralaj kaj Financaj :

Monataj Kunvenoj : permesas amikan babiladon en Esperanto, ekscio de informoj pri la Movado, klarigo de gramatikaj punktoj, prelegeto de Grupano kies celo estas instigo al diskuto. Meznombro 14 personoj ĉe-estis la kunvenojn.

Aranĝoj : Ĉi jare, ni havis la taskon aranĝi la Kongreson de U N E kunFederacio de U F E ; entute 54 personoj partoprenis.

Ekspozicioj, Informado : 1) La mesaĝoj ricevataj (ĉe la M J C) okaze de "Junio en la strato 78" havis la honoron esti prezentitaj en la kadro de ekspozicio de France-URSS en la Halo de la Urbodomo .
2) La gazetoj presas nian monatan artikoleton senmanke ; krome, ili raportis per konvenaj artikoloj kun fotoj, du fojojn okaze de monataj kunvenoj, kaj unu fojon pri la UNE-Kongreso .
3) Televido regiona prezentis raportaĵon pri la Kongreso.
4) Okaze de grava ekspozicio "La Ludoj de la Infanoj" organizita en la Halo kaj Salonoj de Urbdomo, anonco pri Esperanto aperis en vico de reklamoj, seninterrompe, sur televid-ekrano (570.000 vizitintoj)

Ekskursoj : Nuraj vizitoj al la tradicia Rêga Kuko en Yvetot , kaj al la renkontiĝo de la Naturamiko en Val de Saâne .

Vizitoj : Ni havis la viziton de Brazilano, sed ne estis eble arigi multajn membrojn de la Grupo. Same pri la restado dum unu semajno de Dana Samideano ĉe la Familio Caron: la feria tiutempa periodo ne permesis organizi komunan renkontiĝon .

Ejo : Pliafoje, inundo en la ŝranko kiun ni uzas ĉe François 1er, difektis nian materialon: libraron, arkivojn, gazetojn, ktp ...
Subvencio estas petata tiurilate al la Urbaj Instancoj .

Kaso : Ĝia stato estas kontentiga, des pli ke la organizado de la Kongreso postlasis profiton, partigitan kun UNE. Tamen pro la altiĝo de la sendkostoj, oni unuanime decidis porti la kotizon al 15 Fkĵ .

Elektaj : La elirinta Komitato reelektiĝis unuanime ; S-ino Gibaux bonvolas lasi lokon al S-ro Jean Colombel kiu tiel eniras la Komitaton. Oni dankas al ŝi pro ŝia laboro, sciante ke oni povas kalkuli kun ŝia eventuala helpo .

Projektoj : La ĉe-estantaro subskribas komunan inviton al niaj amikoj de Sotono por la semajnfino 26/27 Aprilo 1980 .

Post tiuj laborhoroj , amika kaj kuraĝiga aperitivo vigligis la etoson, kaj la langoj senbridiĝis agrable ...kvankam...foj-foje aŭdiĝis la franca lingvo... sed, certe, nur la vino kulpas !

Poste, Prelego : Nia amiko Maurice Huet kondukis nin en Sovetion !
Sintezo de pluraj vojaĝoj liaj tra tiuj vastegaj teritorioj .Li parolas pri la plej granda lando el la mondo (40 foje pli granda ol Francio) , kaj montras al ni, helpe de grandega mapo tutkovranta la muron, la etapojn de siaj vojaĝoj .Sekvas interesoplena elmontro de diapozitivaj (malavare pri la kvanto, artisme fotitaj pri la kvalito) . Tiuj bildoj kondukas nin tra Leningrado, Kievo, Moskvo, ĝis Taĝento-ĉefurbo de la Azia respubliko Uzbeko- kaj Irkutsko, etapo de la Trans-siberia trajno, kaj la lago Bajkalo, la plej profunda en la mondo... kaj ĝis la tajgo (tĝa) tiu Siberia virga arbaro ...
Dankon pro la vojaĝo !

6
V I V O D E L A G R U P O J (Sekvo)

G R A N D Q U E V I L L Y

Post eldono de 30 000 ekzempleroj de la urba senpaga gazeto " Le Signal " ,kun fotokopio de la flugfolio kiun S-ro Petro Quillaud disdonis 2 000 ekzemplere, kaj afiŝado de tiu flugfolio ĉe montro-fenestroj de magazenoj de la urbo kaj en la koridoroj de la ĉefaj domegoj, Kvin lernantoj sekvas la unuagradan parolan kurson .

R O U E N

Sekve de la inicada kurso (Aprilo/Junio 1979) ĉe la Naturamika Grupo de la Ruena Grupo, dekkvin gelernantoj sekvas publikan kurson pere de la Lernolibro "Nova Racia Kurso" kaj propra metodo dank'al retro-projekciaparato. Plie, du aliaj gelernantoj regule sendas taskojn por la perkorespinda kurso .
Do, nova sango por estonta grupa aktivado .

PRISKRIBO DE AERODROMO


I = Konceptado de Aerodromoj

(Bonvolu trovi teknikan terminaron ĉe la fino de tiu artikolo)

Aerodromo estas aro da virkaĵoj kaj liberaj volumenoj, necesaj por ebligi la aviojn plenumi sian rolon de transportrimedo.

La teknikaj karakterizoj de aerodromo varias laŭ ĝia klaso, kiu mem dependas de la tempo de la plej postulema avio kiun oni decidis akcepti sur ĝin. En Francio, estas kvar klasoj de aerodromoj, signitaj per la literoj A ĝis D . Tiel, aerodromo de klaso A estas aerodromo kies geometriaj karakterizoj (dimensioj, deklivoj, kurbradiusoj) fortikeco de la ŝoseoj, ricevkapablo de la flugstacio; ktp., ebligas ricevi tipojn de avioj kapablaj fari etapojn pli ol 3 000 kilometraj . Male , D-klasa aerodromo estas destinita al nur etaj , turismaj avioj .

Mi donas ĉi-sube ĝeneralan skemon de aerodromo , kaj indikas la nomon de ĝiaj precipaj partoj kaj ties utilon .



- 1°) La dromo : Estas la ĉefa elemento de aerodromo. Temas pri ebena rektangulo, destinita ebligi ekflugojn kaj surterigojn de avioj . Aerodromo povas havi plurajn dromojn, por eventuale alfronti tro gravan trafikon, sed precipe, por provizi malsamdirektajn surterigojn aŭ ekflugejojn, la avioj, precipe la malpezaj, estante tre sentemaj je flankvento .
La larĝo de dromo ĝenerale estas 45 metroj ; ĝia longo varias plej ofte inter 1 000 kaj 3 000 metroj laŭ la klaso de la aerodromo, laŭ ĝia meza altitudo, la meza temperaturo de la regiono, kaj laŭ ĝia deklivo .
La deklivo de dromo je kverprofilo varias inter 1% kaj 3% senkonsidere al la klaso, sed funkcie de la naturo de ĝia tegaĵo. Je laŭlonga profilo, la deklivo povas varii inter 1 kaj 2 % .
- 2°) La bendo : Estas rektangula surfaco, samaksa kun la dromo kiun ĝi entenas kaj transpasas ; ebenigita , senobstakligita , drenita, kompatigita, de feblaj normigitaj deklivoj. Ĝia celo estas ke eliro akcidenta de avio ekster la dromo, ne necese okazigu katastrofon .
- 3°) La standoj : Surfacoj aranĝitaj por atendado de ne flugantaj avioj. Ili dividiĝas je :
- trafikstandoj : tuj apud la flugstacio, dum pasaĝeroj en- aŭ el-iras la aviojn .
- garaĝstandoj : pli malproksimaj de la domumoj, por relative longa atendado .
- mantenadstandoj : kie fariĝas la mentenadon de la avioj , ĝenerale sur gravegaj aerodromoj, apud la laborhangaroj .
La standoj enhavas starejojn, tio estas difinitaj rektangulaj lokoj, kie loĝiĝas la avioj .
- 4°) La rulvojoj : Vojoj aranĝitaj por surgrunda ruliĝado de avioj inter la dromo kaj la standoj .
- 5°) La flugstacio : Domumo kie fariĝas la formalizaĵojn necesajn por la pasaĝeroj (biletkontrolo, registrigo de personoj, kaj bagaĝoj, polic-dogan- kaj sanitarkontroloj .)
- 6°) La teknikejo : Domumo kiu inkluzivas la regadturon , en kiu estas grupitaj ĉiuj oficoj partoprenantaj je la sekureco kaj administrado de la aernavigacio .
- 7°) La fuelizsistemo : Aro de la aranĝoj (cisternoj, duktoj, faŭkoj, kranegoj, ...) destinitaj alporti fuelon al la avioj ĝis la starejoj de la trafikstandoj .
- 8°) La balizaro : Aro de la aranĝoj celantaj plividebligi la dromon, rulvojojn, ... La balizaro estas duspeca :
a) La tagbalizaro : aro da markoj pentritaj sur ŝoseoj .
b) La noktobalizaro : (aŭ lumbalizaro) aro da elektraĵoj , ĉu blankaj, ĉu ruĝaj, verdaj aŭ bluaj lanternoj

Multaj aliaj elementoj ankaŭ partoprenas je konstituo de aerodromo (kraŝvojo, iloso, farosoj, meteaj instalaĵoj...) Mi ne povas ilin ĉiuj eĉ revui en tiu tre supraĵa prezento.

Tamen direnda estas ke, super kaj ĉirkaŭ aerodromo, troviĝas spacvolumenoj senobstakligitaj kaj konservataj senobstaklaj , cele ebligi sekuran malaltiĝon, alproksimiĝon kaj ekflugon de avioj .
Ili estas senobstaklejoj , tre precize difinitaj kaj normigitaj , laŭ la klaso de aerodromo .

85
.../...

Mi nur mencios la plej gravan , la koridoron , kiu ekzistas ĉe ambaŭ ekstremaĵoj de la bendo. Temas pri volumeno senlima supren kaj limigita, grundodirekten de ebena nomita koridorfundo .(7)

La koridorfundoj estas trapezaj ebenaĵoj pasantaj tra la malgrandaj lateroj de la bendo, kiu supreniras laŭ deklivo de 2 ĝis 4 % laŭ la klaso de la aerodromo.

Mi finis tiun tre elementan prezentadon de aerodromoj .

Se vi bonvolas, en proksima numero, ni iom parolos pri ilia konstruado .

H.ROUSSEAU

Teknika Terminaro

Virkaĵo : ouvrage d'art

Virko: génie civil, " Travaux Publics "

Virkejo: chantier de Travaux Publics

Virkatoro: engin de Travaux Publics

Dikvirko: gros oeuvre

Avio = aviadilo (akceptita de S-roj Albault ,
Eichholz, Broise...)

Flugstacio: aérogare

Dromo: piste (d'envol)

Flankvento: vent traversier

Kverprofilo: profil en travers

Laŭlonga profilo: profil en long

Bendo: bande d'envol

Stando: aire de stationnement
(interkonsento ne ankoraŭ okazis)

Domumo: bâtiment

Menteni: entretenir - Mentenado: entretien

Mentenprodukto: produits d'entretien

Starejo: poste de stationnement

Rulvojo: voie de circulation , taxiway

Teknikejo: bloc technique

Regadturo: tour de contrôle

Fuelizsistemo: hydrant system

Balizaro: balisage (de jour, de nuit)

Kraŝvojo: piste de crash


Senobstaklejoj: dégagements

Koridoro: trouée d'envol

Koridorfundo: fond de trouée

Iloso : I L S : Instrument Landing System =
Système d'atterrissage aux instruments
Mot adopté par le Centre Terminologique

Faroso: radiophare (d°)



Regadturo
(Orly)

=====

VOUS AVEZ PU LIRE ,dans ce Numéro 133 =

- Le Bon Sens Populaire et la Langue Internationale
- La vie des Groupes (pages 2 - 5 - 6 -)
- Réunion de Bureau de U N E (page 3)
- Les Cotisations et Abonnements 1980 (page 4)
- La première partie d'une excellente étude de M. Henri ROUSSEAU sur les Aérodrômes (page 6)

=====

Polycopié par le Groupe Esperantiste Rouennais- Dépôt Légal - 3ème Trim 79

Le Gérant: P.LEMARCHAND 43 rue Desseaux 76100 ROUEN

=====